# *Agotagoj okaze de la 170-a jubileo de José Martí*



Januaro estas monato kiam oni rememoras elstaran filon de Kubo, konata kiel la nacia heroo, José Martí, kiu vivis inter la jaroj 1853 kaj 1895.

Li estis forpelita de Kubo flanke de la hispana koloniismo kaj vivis longe en ekzilo en diversaj landoj, en Hispanio, kaj anka? en Usono, Meksiko, Gvatemalo kaj aliaj, sed li ?iam laboris por Kubo kaj la sendependiga milito. Li havis plurajn laborojn kaj profesiojn.

Kiel ?urnalisto José Martí plenumis socian rolon en la disvastigo de kulturo, etiko, scienco, teknologio kaj pluraj aliaj temoj. Li estis homo de universala kulturo kaj vivante en jarcento de multaj transformoj en la kampo teknologia, li ne povis esti for de tiu influo.

En sia verka laboro por diversaj gazetoj de Meksiko kaj aliaj amerikaj landoj, Martí senlace agis diskonigante la sciencan evoluon. El lia plumo de Martí oni povas legi, kune kun profundaj artikoloj pri arto, pentrado kaj aliaj temoj, anka? ri?ajn analizojn pri novaj ma?inoj, sciencaj libroj a? teorioj.

Li verkis artikolojn pri biologio, geologio, medicino, mekaniko farante akutajn recenzojn pri preska? ?io rilata al la teknologia horizonto de sia epoko. E? kiam li verkis la konatan infanlibron “La ora a?o”, li parolis pri teknikaj temoj kiel ekzemple “La historio pri kulero kaj forko.”

Por Martí devas ekzisti simbiozo inter kulturo kaj scienco, ?ar “nenio sugestas tioman kaj tiom belan literaturon kiel scienca paragrafo”.

Sendube José Martí interesi?is pri vasta temaro.Lia unua artikolo pri scienca?o aperis la 2-an de julio 1875. Ekde tiu momento li plurfoje verkis kaj parolis pri tiaj temoj kiel konstateblas en diversaj artikoloj kaj oratora?oj.

Oni ne povas forgesi ke li vivis en Nov-Jorko, urbo kiu tiam travivis grandan evoluon en diversaj agadkampoj. Meze de la preparlaboroj por la sendependiga milito de Kubo, Martí neniam perdis la intereson pri scienca literaturo, kiun li ofte rekomendis al amikoj kaj amatoj.

mgg

---

https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/310559-agotagoj-okaze-de-la-170-a-jubileo-de-jose-marti

Radio Habana Cuba